



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Francilandaj Esperantistoj, 44300 NANTES, Francujo

J A R A B O N O

P. BABIN

Jarabono : 70 fkoj

13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes

P.C.K. Nantes : 2.813.61 L


[Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4]

1990 - 2

(APRIL-MAJ-JUNIO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... Multifacetaj simbol-portantoj



... Loire Kasteloj de la XIII-a jarcento

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

paĝo

El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
Turenaj kasteloj (E. Motillon)	3-4
Universalismo en la Revolucio(3)	
(F. Boyet)	5-6
Enkonduko en la kriptologion	
(B. Golden)	7-9
Birdoj, multifacetaj simboloportantoj	
(S. Boniol)	10-12
Paĝo de la geknaboj (D. Curtis)	13
Por via distro	14
La Vivo en Gresillon	15-16

El Gresillon

La demando ĝenerale farita en tiu epoko de la jaro estas : "Kia anonciĝas la venonta somero?" Rilate la programon kaj la ĉeestantaron, kompreneble. Ĉar rilate la veteron eĉ la specialistoj ne povas tiel frue konjekti traŝan respondon.

Nia certeco pri la nombro da ĉeestantoj ne estas nun multe pli granda ol tiu de la meteorologoj koncerne la estontan veteron. Pli kaj pli malfrue alvenas la aliĝoj. Frutempa prognozo ne eblas. Personoj, kiuj petis informojn jam lastan novembron aliĝas nur nun. Pertelefonaj aliĝoj pli kaj pli oftigas, eĉ el foraj landoj. Ni nur scias, ke por junio kaj julio la nombro da aliĝintoj estas kontentiga. Ankaŭ kontentiga estas la anoncita partopreno de eksterlandanoj. Kiel la antaŭajn jarojn ili konsistigos almenaŭ la duonon de la tuta ĉisomera

la antaŭajn jarojn ili konsistigos almenaŭ la duonon de la ĉisomera ĉeestantaro.

Alia tendenco plifirmiĝas, bedaŭrinde. La datoj de ĉeesto pli dependas de la tuta libertempa programo de la aliĝantoj ol de la programo proponita de ni. Pligrandiĝas la nombro da ĉeestantoj sed, samtempe, mallongiĝas la daŭro de ilia ĉeesto. La dato de la komencigo de staĝo gravas pro la eblecoj pli malpli facilaj, pli malpli multekostaj, proponitaj de la fervojaj kaj flugaj kompanioj. Plej ofte, ne pro malfacila financado la vizitantoj ĉeestas nur unu semajnon, sed pro la deziro viziti alia(j)n loko(j)n dum la ferio-periodo. La ebleco profiti posmajnajn libertempojn donitajn de kelkaj entreprenoj, akcelas tiun tendencon. Ĉu ni rajtas plendi, ke Gresillon, por kelkaj esperantistoj estas agrabla loko, kie oni libertempas en internacia esperantista medio?

Esperanto tra la Mondo



KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ -

La Universala kongreso en Kubo aktive prepariĝas. La prezidanto de la honora komitato estas Dro Armando Hart Davalos, ministro pri kulturo. Allogaj ekskursoj estas proponataj.

En 1991 la universala kongreso de UEA okazus en Bergen (Norvegio), kaj la junulara kongreso en Karlskoga. En 1992 la UK verŝajne okazos en Prago kaj la junulara kongreso en Slovakio. Ankaŭ verŝajne la UK en 1993 okazos en Valencio kaj la junulara kongreso en Katalunio.

La 63-a SAT-Kongreso okazos en Linz (Aŭstrio) de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto. Adreso: Max Hollinger, Gruberstr. 65, A-4020 Linz (Aŭstrio)

La 5-a Pacifika Esperanto-kongreso okazos en Ĉinio en 1992.

Eburborda Esp-Asocio, UTE (Togo) kaj BEA (Benino) preparas la unuan Afrikan Kongreson kun espero interesi ankaŭ eksterafrikanojn. Ĝi okazos de la 17/12/90 ĝis la 7/1/91 en la tri landoj po unu semajno. Vojaĝ-informoj haveblaj ĉe UEA.

Konferenco pri Interkibernetiko okazos en Proprad (Ĉeĥoslovakio) dum septembro. Informas: Akademio Internacia de Sciencoj, Kleinerberger Weg 16 B, D-Paderborn, FR Germanio.

Internacia Renkontiĝo de Esperantistaj Edukistoj (Freinet-Pedagogio) okazos en Svedio, 1/8 ĝis 11/8 1990. Informas: Paul Poisson, 239, rue Victor Huga, F-37540 St Cyr sur Loire.

JUBILEOJ- Laŭ decido de UN/UNESKO, 1991 estos la jaro de la Rusa Kulturo. Laŭ iniciato de Moskva Scienca Esperanto. Klubo okazos sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj, San Marino. La temaro estos: Lingvo, Kulturo, Ekologio.

Antaŭ 100 jaroj naskiĝis Vasilij Eroŝenko, rusa blinda poeto kaj novelisto, esperantisto, pri kiu la sovetia poŝto eldonis dulingvan koverton.

En 1991 la esperantistoj festos la centjaran datrevenon de niaj famaj poetoj: Kaloman Kalocsay kaj Julio Baghy.

TURISMO- La Esperanta Turisma Sekcio de la Pekina Tian'an Turisma Servo estas je la dispono de la eksterlandaj esperantistaj turistoj por aranĝo de vojaĝoj. Adreso: S-ro Zhu Baohua, 8 Dongzhimen Nandajie, CN-100027, Pekino.

Fine de la lasta jaro okazis en la antikva urbo Xi'an esperanto-turisma simpozio iniciatita de la Paca Esperanto-Turisma Centro. Ĝin ĉeestis 52 reprezentantoj de turismaj servoj kaj respondeculoj de esperanto asocioj el 12 provincoj. Oni proponis fondi esperantan turisman retan en Ĉinio kun la nomo "Pactur".

En Bydgoszcz, Pollando, kie estas la sidejo de la organizo Esperantista Monda Turismo, estis inaŭgurita esperanto-hotelo. Estas ankaŭ projekto funkciigi esperanto-hotelon en la montara regiono de Herzberg, en Germanio.

RUMANIA ESPERANTO-MOVADO- La esperanto-movado rekonstruiĝas nacie kaj en multaj lokoj, sub la prezidanteco de Prof. Dro Ignat Bociort. Restariĝis ankaŭ Tutlanda Universitata Esperanto-Centro. Proponu eventualan helpon al: Rumana Esperanto-Asocio, C.P. 37-146 Bucuresti.

FAKOJ- Fondiĝis Esperantista Komputila Rondo. Vi povas aliĝi skribante al: J. Wulff, Papenstr. 5B, D-2000 Hamburgo, Germanio.

Esperantlingva ekologia bulteno aperas, kies titolo estas "Sunradioj". La esperantistaj "verduloj" povas kontakti la Asocion de Verduloj esperantistaj, ĉe Emile Mas, 38 rue Jean Moulin, 33220 Ste Foy-la-Grande, aŭ Asocio de Verduloj por Uzado de Esperanto: Jean-Luc Mermet, 71340 St Bonnet-dé-Cray, Francio.

Turenaj Kasteloj

XIII.a XV.a J.C.

La konstruado de la fortikaĵoj, kompreneble, evoluis samtempe, kiam pliperfektigis la atakrimedoj. Ekde la dektria jarcento, la turoj ne plu estas kvadrataj, sed duonrondaj aŭ tute rondaj. Ilia fundamento kaj ilia supertera bazo plilarĝiĝas. Ofte unu aŭ du pliaj defendaj etaĵoj estas konstruitaj. Anstataŭ la moveblaj lignaj balkonoj, kiujn oni instalas ĉe la supro de la muroj dum atako, oni konstruas eksterajn galeriojn ĉirkaŭ la tuta kastelo. Oni nomas ilin "machicoulis" t.e. verŝaperturoj. La supra teraso de la turoj estas protektata de alta konusforma tegmento. Sur la supro de la remparoj kaj turaj muroj estas aranĝata la "rondira voĵeto", dank'al kiu la gardantaj soldatoj povas observi la tutan ĉirkaŭan kamparon.

Feliĉe, ne nur la militista scienco evoluis, sed ankaŭ la moroj iom mildiĝis. Dum la krucmilitoj, niaj duonbarbaraj kavaliroj kontaktiĝis kun la artema kaj rafinita orienta civilizacio. Plie, iom post iom, la lando paciĝis. La militoj inter grandaj feŭdaj sinjoroj ĉesis. La lando malrapide unuiĝis, kaj la nomo Franclando jam ne estis nur geografia esprimo; ĝi eksignifis lando loĝata de unu granda popolo.

La konstruanto ricevas novan evoluigon. Se la ekstera aspekto de la kasteloj estas ĉiam tiu de impona fortikaĵo, la interna aspekto ŝanĝiĝas. La fasadoj sur la kortoj estas heligitaj de grandaj fenestroj, provizitaj de vitraloj, ofte artaj; ilin foje protektas dikaj lignaj ŝirmiloj. Skulptaĵoj aperas sur la muroj kaj sur la fenestraj kadroj. Aero kaj suno eniras en la vastajn ĉambrojn. Ĉi-tiuj ricevas ornamaĵojn. La tiamaj "bildistoj" ne plu rezervas sian arton por la religiaj konstruaĵoj; ili skulptas la belajn ogivajn volbojn. La nudeco de la muroj estas vestita per belaj murtapiŝoj, foje per artaj

pentraĵoj. Sur la plankoj sterniĝas lanaj tapiŝoj.

La familia vivo jam ne havas, kiel ejon, la unikan ĉefturan ĉambron. Ĝi havas sian propran ĉambraron. La publika vivo -akcepto de vizitantoj, ceremoniaj aŭdiencoj, juĝaj kunsidoj- okazas en la "ĉambrego", la plej granda ĉambro en la kastelo, lukse ornamita. Tie okazas ankaŭ festoj kaj bankedoj. Ĝi komunikas kun la "ĉambro", centro de la familia vivo. La ĉambro estas riĉe ornamita, la plafonaj traboj estas pentritaj, la alta kaj profunda kameno estas ornamita per skulptaĵoj, kies centra temo estas la blazono de la kastelsinjoro. La ĉefa meblo estas la granda baldakena lito kun siaj luksegaj kurtenoj. Skulptitaj benkoj kun dorsapogilo, katedro por la kastelestroj, preĝa benko, grandaj ŝrankoj, longa tablo, telermeblo kun stana kaj arĝenta manĝilaro, kofroj, konsistigas la meblaron. Valoraj ŝtofoj kaj brodaĵoj kompletigas la ornamadon de la ĉambro. Nun la kuirejo estas aparta loko. Krom la kameno, ĝi havas kuirfornon kaj bakujon. La kuirilaro, krom la terpotoj, konsistas el gigaj potoj, feraj patoj kun longaj teniloj, feraj kaj kupraj kaseroloj. La kuirarto tre progresis. Bankedoj estas oftaj kaj daŭras plurajn horojn. Vaksaj kandeloj provizas lumon. En apuda ĉambro aŭ en apuda paviliono, troviĝas la "brogejo", t.e. la banĉambro. Ĉar tiam oni ŝatis korpan purecon. Bedaŭrinde tiu kvalito iom post iom malaperis; en la luksaj palacoj de la XVIIIa jarcento, kiel ekzemple Versailles, ekzistos neniu banĉambro kaj eĉ ne unu el tiuj malgrandaj ejoj higieno necesaj!

Ankaŭ kapelo estis en ĉiu kastelo, foje nur granda ĉambro, plej ofte aparta konstruaĵo; sed ĉiam bele ornamita.

En Tours mem ni povas vidi belan ekzemplon de la militista konstruado dum la fino de la Mezepoko. Du altaj rondaj turoj, proksime de la katedralo, estas la restaĵoj de la vasta kastelo konstruita por protekti la urbon kontraŭ

eventualaj atakoj. La norda turo, kies fortika fundamento merĝis en la rivero, alte superas la kazernon, kiu anstataŭas la aliajn mezepokajn konstruerojn. La altega turo kun sia altpinta tegmento elstaras kvazaŭ dikega ŝtona cilindro kun mallarĝaj pafembrazuroj.

Du mirindaj tipoj de la kasteloj de tiu epoko, kiu daŭris de la XIII-a ĝis la fino de la XV-a jarcentoj, estas Luynes kaj Langeais, sur la dekstra bordo de la Loire. Du najbaroj, ĉar nur 10 kilometroj ilin distancigas. Veturante sur la vojo, kiu kuŝas sur la digo de la rivero, la kastelo de Luynes, konstruita sur alta abrupta promontoro de malproksime aperas antaŭ ni kiel grandioza gardostaranto protektanta la tutan ĉirkaŭan landon. Ĝia griza maso de masivaj muregoj kaj rondaj turoj kronitaj de pintaj ardezaĵaj tegmentoj ŝajnas altiĝi ĝis la ĉielo. Alproksimiĝante, ni vidas ĉarman urbeton sterniĝantan ĉe la piedo de la kastelo, kiu iam havigis al ĝi sekurecon kaj vivkapblon. Interne, la kastelo ja indas viziton pro sia beleco. Bedaŭrinde, duko de Luynes, kiu ankoraŭ loĝas en ĝi, malpermesis viziton post grava ŝtelo fare de iuj personoj enirintaj kun turistoj. Ni eĉ ne povos vidi la larĝajn profundajn fosaĵojn transformitajn en mirindan ĝardenon fare de vera artisto. Ni tamen iru ĝis la piedo de la kastelo. Tabuloj indikas al ni la plej belajn vidlokojn. Ni povas admiri la impresigan konstruaĵon kvazaŭ elŝprucantan el la roko. Vidinte tion, ni scias, kio estis mezepoka fortikaĵo. Kaj ni konservas neforgeseblan memoron pri ĝia impona aspekto kaj potenca majesteco.

Irante al Langeais, ni haltu en Cinq-Mars. La ruinaĵoj de la kastelo, parte malkonstruita laŭ ordono de la reĝo, estas tre interesaj. La interno de la ĉefturo montras kuriozan specimenon de frugotikaj volboj. Kurioza ankaŭ estas la antikva "ghetto" ankoraŭ nomata la "judejo". Veturinte kelkajn pliajn kilometrojn, ni alvenas

en Langeais. Trairinte parton de la urbeto, jen antaŭ ni staras la kastelo. La vojo nun estas sur la loko de la iamaj fosaĵoj. Fronte al ni estas la pordego de la kastelo kun sia levponto, flankumita de du dikaj turoj. La ĝenerala aspekto estas tute simila je tiu de Luynes, sed pro ĝia proksimeco kaj ne tre alta situo super la vojo, ni ne povas vidi ĝin en ĝia tuteco. Ĝia severa potenco ne aperas tiom grandioza kiom tiu de Luynes. Ni trairu la levponton. Vera surprizo nin atendas. Se ekstere la kastelo estas potenca, malluma fortikaĵo, interne ĝi estas vera palaco. Instituto de Francio, nuna posedanto de la kastelo, zorge riparigis la ĉambrojn, kiuj retrovis sian primitivan lukson. Mezepokaj aŭtentikaj mebloj kaj multaj tieepokaj objektoj estis kolektitaj. Dum la vizito ni povos forgesi la nunan epokon. Nian modernan epokon tamen memorigas al ni nia gvidisto. Sed tie-ĉi, li ne recitas parkere lernitan lecionon. Li nur premas butonon, kaj kaŝitaj lampoj plenlumigas artajn detalojn, kiujn ni ne estus rimarkintaj. Kaj mistera sed klara voĉo kun eleganta dirmaniero, eksplikas kaj rakontas. Agrabla vizito, instrua kaj ne laciga. Tiel, la aŭtomatismo de nia jarcento helpas al pli funda kompreno de la arto kaj vivo de la homoj de la XV-a.

En tiu kastelo de Langeais okazis unu el la plej grandaj eventoj de la franca historio: la edziĝo de reĝo Karlo VII-a je dukino Ana de Bretonio. Bretonio, la antikva Armoriko, ĝis tiam rezistadis la iom-post-ioman unuigon de Francio. Ĝiaj keltaj loĝantoj alte taksis sian sendependecon. La longa strebado de la francaj reĝoj ĉiam malsukcesis kontraŭ ilia obstino. En la jaro 1491, per tiu geedziĝo, finiĝis la rivalco inter la du landoj, kiuj de tiam unuiĝis.

Antaŭ ol forlasi la kastelon de Langeais ni povos admiri la belan ĝardenon kaj la restaĵojn de la unua kastelo konstruita de "Nigra Falko", pri kies kvadrata ĉefturo mi jam parolis.

E. Motillon

Universalismo en la Revolucio de 1789 (3)

La situacio en Belgio- La tiama Belgio estis plejparte sub la aŭtoritato de la imperiestro de Aŭstrio. En 1787, la prilumita despoto Josefo la 2-a (la frato de la franca reĝino) iniciatis reformojn, kiuj ne plaĉis al la enloĝantoj. La opozicio ricevis du formojn: la "statistes", kiuj estis privilegiuloj, kaj deziris konservi siajn privilegiojn (same, kiel la francaj parlamentanoj de la sama epoko), kaj la "patriotoj", kiuj provis imiti la usonan militon kaj sekvis la tiel nomatan "priluman spiriton".

Post la 4-a de aŭgusto 1789, la loĝantoj de Liège ribelis kaj dank'al siaj armiloj estris la urbon. En oktobro 1789, la ribelo okazis en Gent. La 18-an de decembro la aŭstraj trupoj estis forpelitaj de Bruselo kaj la 11-an de januaro 1790 kunveno en Bruselo deklaris la naskiĝon de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Belgio. Sed en tiu nova reĝimo, la "statistes" ricevis la plimulton, kaj por konservi siajn privilegiojn, ili alvokis la Aŭstrojn.

La situacio en Anglio- Anglio, kiu jus perdis la militon kontraŭ la ribelintaj kolonioj, ne tre emis al libereco, kaj precipe deziris konservi sian ekonomian rangon. Pro tio, ĝi deziris pacon kaj timis la malbonan influon de revoluciaj bataloj sur la kontinento. La novaĵoj pri Francio instigis dividon en la liberala partio (whig) inter Thomas Paine (favora al la franca revolucio) kaj Edmund Burke, kiu montris sian opozicion en libro "Pensadoj pri la franca revolucio". En tiu libro li asertis, ke la Angloj, en la revolucio de 1688, defendis la tradicion kontraŭ la regnestro, dum la Francoj ĉion detruis kaj kredis ebla novan konstruon bazitan sur nuraj metafizikaj abstraktaĵoj. Tiu divido favoris la konservativulojn (tories), kiuj kondukos ĉiujn aliancojn kontraŭ la franca revolucio.

La reagoj en Eŭropo- Kant estis admiranto de la revolucio. Okazis ribeloj en Pollando kaj Hungario, dum Hispanio, sin apoganta sur Inkvizicio, provis konstrui barilon kontraŭ la "franca pesto". En Parizon venis multaj admirantoj de la revolucio el la tuta Eŭropo. Eĉ Thomas Paine, kiu venis el Usono, kvankam li ne parolis la francan lingvon, estis deputito en la Konvencio. Tiu alveno de nefrancoj pligrandigis la universalan karakteron de tiu evento.

Laŭ la esprimo de Thomas Paine: "Ĝis tiam la popoloj estis ribelintaj kontraŭ iu aparta regnestro pro personaj malamoj, sed en Francio, ni vidas revolucion bazitan sur pripensita ekzameno de la homaj rajtoj kaj kiu distingas, ekde la komenco, la principojn disde la personoj."

KONKLUDO- Ni vidis, kiel granda estis la diferenco inter la ideoaro esprimita speciale en Francio sed ankaŭ en Eŭropo, kaj ofte nomata "la spirito de la lumoj", kaj la politika stato de la franca reĝlando, kiu konservis feŭdajn karakterojn.

Dum, aplikante tiujn ideojn, la anglaj koloniistoj de Ameriko sufiĉe facile povis krei novan ŝtaton sur nova teritorio, la Francoj devis serĉi kompromisojn inter iuflanke la universalisma idealo de la filozofoj, de la modernaj industriistoj kaj komercistoj, kaj aliflanke la rezistado de la apogantoj de la kutimoj, de la tradicioj kaj de la valoroj ligitaj al tiuj politikaj strukturoj, kiujn la scienca progreso kadukigis.

Se poste, speciale pro la milito, la principoj de 1789 estis distorditaj, ja tiuj principoj gvidis dum la 19-a jarcento la diversajn popolojn, inkluzive de la franca, kiuj daŭre luktis por plibonigi siajn

sociajn vivkondiĉojn.

Ĉiam temis pri modernigo de la socio, sed ie tiu progreso trudis sendependecon, en alia loko, la progreso postulis la unuiĝon por konstrui novan nacion, sed en ĉiuj okazoj ekzistis ĉe la "patriotoj" la zorgo alporti al la individuoj la valorojn difinitajn en la 18-a jarcento, kaj kiujn resumas la devizo de la franca respubliko en la fino de la 19-a jarcento: Libereco, Egaleco, Frateco.

Kompreneble tiuj nocioj, kiujn oni povas nomi "metafizikaj abstraktaĵoj" (Burke) povas kaŝi tre malsimilajn sintenojn. La usonanoj, kiuj batalis por la sendependeco, konservis la sklavan sistemon ĝis la mezo de la 19-a jarcento, kaj la afero solvigis per terura milito. Tiuj blankaj kolonintoj malaperigis la indiĝenojn, kiuj estis la veraj amerikanoj. Post la malapero de

la ruĝhaŭtuloj la nigruloj devis atendi la finon de la 20-a jarcento por vere akiri la civilajn rajtojn.

La franca konstitucia asembleo, en 1789, sub la influo de la deputitoj de la "kolonioj", konservis la sklavan sistemon en tiuj kolonioj. Tiun sklavismon nuligis nur la respubliko en februaro 1794.

La Eŭropanoj, ĉiam en perspektivo de industria elvolviĝo, koloniigis la tutan Afrikon kaj grandan parton de Azio. Tio pravas, ke oni ĉiam povas ruzi kontraŭ la principoj kaj akordi pli da valoro al iuj homoj ol al iuj aliaj. Tiu tendenco al apartigo, al partikularismo estas fundamenta en la homa naturo; politika universalismo estas nova eltrovo; oni ne devas miri, ke ĝi estas malfacile aplikebla, kaj pro tio ĝi estas defendinda valoro.

F. BOYET



Kien ili iras ?

**Al GRESILLON,
kompreneble.**

Ĉu ankaŭ vi ?

Petu informojn: **ESPERANTO**
Kastelo Gresillon. 49150-BAUGÉ

Enkonduko en la kriptologion

DIFINOJ DE TERMINOJ-

Kriptologio estas la scienco pri traktanta kaŝitajn aŭ sekretajn komunikaĵojn. Ĝi okupiĝas pri metodoj kaj aparatoj uzataj, unuflanke por kamufli komunikaĵojn (aŭ eĉ tute kaŝi ilian ekziston), kaj aliflanke por malkovri kaj deĉifri tiajn komunikaĵojn ellaboritajn de aliaj sendantoj kaj ricevantoj. La procedo enkriptigi tekstojn nomiĝas kriptografio. Estas necese elpensi metodojn por prepari kriptogramojn, t.e. ĉifrojn aŭ kriptajojn, por ke ili estu nekompreneblaj al ĉiuj, krom tiuj, kiuj rajtas posedi la rimedojn por deĉifri la mesaĝojn kaj rehavi la originalan klartekston. Per enkriptigo, do, oni konvertas klartekston en ĉifrotekston. La inversa procedo, elkriptigo, kutime estas plenumita de rajtigita komunikanto posedanta la ŝlosilon por rekonverti la kriptogramon en senchavan formon. Kaze de sekretaj komunikaĵoj senditaj dum spionado, militaj operacoj, komerca konkurenco ks., la oponantaj grupoj klopodas reciproke informiĝi pri la enkriptigitaj sistemoj uzataj de la aliaj per apliko de teknikoj de kriptanalizo. Kriptanalizistoj devas havi profundan scion pri matematiko kaj lingvoj.

ĈIFROSISTEMOJ- Ĉiu ĉifrosistemo devas kombini du elementojn, la ĝeneralan sistemon kaj la specifan ŝlosilon. La ĝenerala sistemo estas aro da procedoj aŭ paŝoj, konsistigantaj la bazan kriptografian traktad-metodon. Interkomunikantoj akordas pri tiuj reguloj antaŭe, kaj ilia karaktero restas konstanta. Male, la specifa ŝlosilo estas variigebla laŭ karaktero kaj povas konsisti el nombro aŭ serio da nombroj, vorto, frazero aŭ tutaj frazoj. Por enkriptigo la ŝlosilo reguligas la paŝojn de la ĝenerala sistemo kaj determinas la specifan naturon aŭ precizan enhavon de la farota ĉifraĵo. Dum deĉifrado, la ŝlosilo simile reguligas la paŝojn kaj determinas, kio estos la deĉifrita teksto. Se ĉiuj operacioj estas ĝuste faritaj, la du klartekstoj, antaŭ ĉifrado kaj post deĉifrado, devas esti identaj aŭ proksimume

identaj. La ĝenerala sistemo devas esti tiel konstruita, ke eĉ se ĝi estas konata de nerajtigita persono, neniu ĝuste enkriptigita mesaĝo povas esti legata de li, krom se li scias ankaŭ la ŝlosilon aŭ ŝlosilojn aplikeblajn al tiu mesaĝo.

TRANSPONAJ KAJ SUBSTITUAJ ĈIFROJ-

La du bazaj specoj de ĉifroj estas la transpona ĉifro kaj la substitua ĉifro. Unu ilustra ekzemplo de ĉiu speco kaj variaĵo de ĉifro estos prezentita, kaj kelkaj mallongaj tekstoj servos kiel ekzercoj por elkriptigo.

Transponaj ĉifroj- Ili baziĝas sur rearanĝado aŭ ŝanĝo en la sinsekvo de literoj de klarteksta mesaĝo sen iu ŝanĝo en ilia identeco. Ekz.: OI COSA OT NA REPSE A LASREVINU. Ŝajnas, ke temas pri teksto en fremda lingvo, sed vane oni trafolumos milojn, eĉ dekmilojn da vortaroj; ne eblos traduki la tekston, ĉar ĝi ne estas lingva teksto sed ĉifro. La originala teksto estas ne nur alimaniere dividita sed ankaŭ inversigita. Por trovi la solvon, kunmetu ĉiujn "vortojn" kaj legu la tuton de dekstro maldekstren, serĉante limojn inter la vortoj. OICOSAOTNAREPSEALASREVINU. OICOSA/OTNAREPSE/ALASREVINU = UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO.

Ekzerco 1: NEALNOD NOMSI NEVAVO
NOT NESARTA LOD NOMSA RIATRO FOKOV.

Kriptajo formita per mesaĝo inverse skribita estas tro facile solvebla, eĉ de laikoj, do estas necese transponi la tekston laŭ pli komplika maniero. Unu metodo estas per divido de la mesaĝo en du partojn, tiel ke alternaj literoj troviĝas sur apartaj linioj. Poste la ĉifraĵo estas reskribita laŭ la nova ordo de la literoj. "PLENA ILUSTRITA VORTARO" estas enkriptigita kaj la literoj grupigitaj kvinope.

Ekz.: P E A L S R T V R A O
L N I U T I A O T R

PEALSRTVRAOLNIUTIAOTR

PEALS RTVRA OLNIU TIAOT RNPSJ

La uzo de kvinliteraj grupoj kaŝas vortlimojn kaj faciligas transsendon de la mesaĝo. Se mankas literoj en la lasta grupo, oni povas aldoni iujn ajn por havi kvin. Deĉifrado estas efektivigita per inversigo de la paŝoj. Estas necese serĉi la dividpunkton de la originala teksto. La dektria litero, N, ne taŭgas, sed la dekdua, L, malkovras la vojon al elkriptigo.

Ekzerco 2: AVHPT NAEKR AITRF REOAO DNEAT LIOOE CSNOP MSEOO TGLMN ORGNA.

Substituaj ĉifroj- La malforteco de transponaj ĉifroj estas la uzo de la samaj literoj, kiel tiuj de la klarteksto. Por malfaciligi la taskon de deĉifrado, estas necese substitui al la originalaj literoj aliajn literojn aŭ aliajn simbolojn sen iu ŝanĝo en la sinsekvo, aŭ transpona kaj substitua ĉifrado povas esti kombinita en unu kriptosistemo. La plej simpla metodo estas dufoje skribi la alfabeton, sur unu linio laŭ normala vicordo de la literoj kaj sur sekva linio en unu el la diversaj tipoj de substitua alfabeto.

Antaŭ ol fari tion estas necese modifi la Esperantan alfabeton per uzo de digramoj kun "h" anstataŭ literoj kun la cirkumflekso, kaj per "u" anstataŭ "ŭ"; temas pri la surogata alfabeto de d-ro Zamenhof. Estu aldonitaj ankaŭ la literoj "q", "w", "x", "y" por ebligi skribadon de fremdaj vortoj kaj nomoj. Kun tiu pli kompleta latina alfabeto, la lingvo de la kriptajo ne estas tiel facile identigebla, kiel Esperanto.

Estas du formoj de substituaj ĉifroj, la rekta normo kaj la inversa normo.

Rekta: ABCDEFGHIJKLMNOPQRSTUVWXYZ
LMNOPQRSTUVWXYZABCDEFGHIJK

Ĉi-speca ĉifro estas reciproka substituo. En Kriptologia notacio $A_k = L_c$ kaj $L_c = A_k$ (k-klarteksto, ĉ-ĉifroteksto).

Inversa:

ABCDEFGHIJKLMNPOQRSTUVWXYZ
CBZYXWVUTSRQPONMLKJIHGFE

Ekzerco 3: XOLJY PUKJC LIXLC JOTCQ CJCTN OLPUC KCPSJ CCXYL OSQDR.

MIKSITA ĈIFRA ALFABETO-

Variaĵo de substitua ĉifro utiligas alfabetojn, en kiuj troviĝas kodvortoj, kiuj malfaciligas la procedon de deĉifrado. Oni elektas tiajn kodvortojn, en kiuj ne aperas dufoje la sama litero, kaj skribas la neuzitajn literojn de la alfabeto laŭ vicordo. En la sekvaj ekzemploj la kodvorto ZAMENHOF aperas ĉe la komenco de la normala alfabeto kaj la kodvorto GRABOWSKI en la mezo de la substitua ĉifra alfabeto.

Normala: ZAMENHOFBCDGIJKLPQRSTUVWXYZ

Substitua- MNPQTUVXYZGRABOWSKICDEFHJL

Ekzerco 4: SWEFN CONBS WEFNC ONBSW EFNCO NBSWE FNCCQ TZUQC QCQTX ATQCC TUNWD QRTZX.

KVADRAT-DIAGRAMO KUN ŜLOSILVORTO-

Ankoraŭ unu variaĵo de la transponita miksita sistemo estas derivebla de diagramo, en kiu la ŝlosilvorto estas HODLER.

HODLER
ABCFGI
JKMNPQ
STUVWX
YZ

Post HODLER sekvas la neuzitaj literoj de la alfabeto laŭ vicordo. Oni legas la vertikalajn kolumnojn por formi la ĉifran alfabeton, kaj tiel la ŝlosilvorto ne estas evidenta. La ricevanto de la teksto scias la kodvorton. do li povas konstrui la diagramon.

Normala: ABCDEFGHIJKLMNOPQRSTUVWXYZ

Substitua: HAJSYOBKTZDCMULFNVEGPWRIQX

Ekzerco 5: GVHSY UEHMH CCPLM AVTCY GHECH JYCLH CDTPD PVHBK YUTTV HELWI.

PLURFLANKAJ SISTEMOJ-

La ekzemploj de ĉifroj prezentitaj ĝis nun estas unuflankaj, t.e. la ĉifraj ekvivalentoj de klartekstaj elementoj konsistas el unuopaj literoj. Ilia malavantaĝo estas, ke per statistikaj analizoj de la ofteco de ĉifraj ekvivalentoj en sufiĉe longa teksto, estas eble trovi la lingvon de la teksto. La sekvaj paŝoj estas serĉi ripetiĝantajn litergrupojn, kiuj povas esti gramatikaj finaĵoj, afiksoj kaj ofte uzataj vortoj, kiel la difina artikolo, prepozicioj kaj konjunkcioj. En

plurflankaj sistemoj la ĉifraj ekvivalentoj konsistas el du aŭ pli da literoj aŭ ciferoj derivitaj de duflankaj aŭ dupartaj matricoj aŭ diagramoj.

En la alfabeto kvadrat-diagramo la koordinatoj estas la nomo JULIO BAGHY; Ĉiu klarteksta litero havas du-literan ekvivalenton; tiel la litero S povas esti enkriptigita per HL aŭ LH. La diagramo kun cifraj koordinatoj havas la kodvorton SCHWARTZ sekvtan de la literoj de la alfabeto ankoraŭ ne uzataj. Oni enkriptigas, prenante ciferon unue de la vertikala koordinato, poste de la horizontala; tiel K fariĝas 15.

J U L I O	0 1 2 3 4 5 6 7 8 9
B A B C D E	0 S C H W A R T Z B D
A F G H K	1 E F G I J K L M N O
G L M N O P	2 P Q U V X Y
H Q R S T U	
Y V W X Y Z	

Jen kiel KULTURAJ KAJEROJ estas enkriptigita en ambaŭ sistemoj: AOHOG JHIOH HUBJA IOAJB IABOU HGIAI=AO HO GJ HI OH HU BJ ktp.

15221 60622 05041 41504 14100 51914=15 22 16 06 22 05 04 14 15 04...ktp.

Estas eble modifi plurflankajn sistemojn, por ke estu pli ol du ĉifraj ekvivalentoj por klartekstaj elementoj.

U.V.W.X.Z

P.Q.R.S.T

A F K A B C D E

B G L F G H K

C H M L M N O P

D I N Q R S T U

E J O V W X Y Z

Kriptiganto povas uzi laŭplaĉe iun el la ses ĉifraj variaĵoj por H laŭ la ordo vico-kolono: BR GR LR BW GW LW. Cetere, ĉar vicaj koordinatoj estas diferencigitaj disde kolumnaj koordinatoj, estas eble formi ĉifrajn ekvivalentojn ankaŭ laŭ la ordo kolono-vico. Tio donas ankoraŭ ses ĉifrajn variaĵojn por H: WB RB WG RG WL RL.

Ekzerco 6: BWMXC QBXKP ZLHSQ NHWTF
KQUFN SNZCV AUCPI KVIFP WMGTE USLUC
KTTKP CQMGX UAFVI QZDWI XDXCC WIZHR
WCKZN WFPMP DXZDP GHXQN

Tiu ĉi mallonga enkonduko en la kriptologion havis kiel celon prezenti kelkajn manierojn enkriptigi tekstojn. Ekzistas multe pli komplikaj metodoj, kelkaj el kiuj utiligas specialajn ĉifrad-maŝinojn.

Bernard GOLDEN

Solvoj de la ekzercaj ĉifraĵoj:

1. EN LA MONDON VENIS NOVA SENTO TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO.
2. AL VI HO POTENCA SENKORPA MISTERO FORTEGO LA MONDON REGANTA.
3. FORTE NI STARU FRATOJ AMATAJ POR NIA SANKTA AFERO.
4. PLUVAS KAJ PLUVAS KAJ PLUVAS KAJ PLUVAS SENCHESE SENFINE SENHALTE.
5. TRA DENSA MALLUMO BRILETAS LA CELO AL KIU KURAGHE NI IRAS.
6. HO MIA KOR NE BATU MALTRANKVILE EL MIA BRUSTO NUN NE SALTU FOR.



BIRDOJ

MULTFACETAJ SIMBOLPORTANTOJ

Ekde la praaj tempoj, en ĉiuj kulturoj kaj tradicioj, la birdoj, kaj ties flugiloj, fascinadas la homaron. Pro sia flugpovo, birdo simbolas: la ĉielajn kaj terajn interrilatojn (multloke notindas la kontrasto inter birdo ĉiela kaj serpento tera); la spiritaĵajn valorojn (eĉ la anĝelan regnon.).

Por la Ĉinoj la blujaj birdoj estas feinoj; en antikva Hindujo birdoj simbolis la amikecon de la diaĵoj al la homestaĵoj, dum ĉe la Keltoj, cikonioj, gruoj, ardeoj kaj regoloj estis konsiderataj, kiel Di-senditoj. Dumsonĝe birdo prezentas la propran personon de la dormanto.

La flugiloj siaflanke signas malpeziĝon, liberigon, senmateriigon, elanon por transcendi la homan statuson. Tial, ke ili estas signo pri venko, al la herooj oni ilin aljuĝas (ni pensu pri Hermeso kun la flugilhavaj kalkanoj).

Tamen ĉiu pozitiva elemento entenas sian negativan aspekton. Ĉi-okaze ĝi rimarkeblas en asimilado de la noktuo al fantomoj kaj en nestabileco de flugetanta imagpovo. Ornitomancio, kiu baziĝis sur la interpretado de birdaj krioj kaj flugomovoj, konsistigis alte taksatan divenoteknikon en la Antikveco. Flankenlasante la mitajn kaj blazonkoncernajn birdojn, ni elektos studotajn specimenojn, kiuj enfokusigas la malsamajn hom-sintenojn koncerne la saman realon. Por simpligi la taskon al la leganto, la laŭvicaj kategorioj aperos en alfabeto ordo.

Sed ni plej unue omaĝu al la ĉie agnoskata birdo-reĝo, la Aĝla Moŝto (el la familio de akcipitradoj), rabobirdo fama pro sia ampleksega flugillargo kaj akra vido. Birda reĝo, sendito, aŭ substituito, de la plej alta diaĵo, la Suno, kiun nur ĝi aŭdacas kaj sukcesas rekte alrigardi. Aĝlo, atributo de Zeŭso, kaj de Kristo, cezara kaj napoleona emblemo, simbolanta patrecon ĉiuspecan

spiritecon, eĉ anĝelojn, senperan konon kaj kontempladon (pro tio Sanktan Johanon, la evangeliiston oni titolis Aĝlo). En kelkaj mezepokaj artoverkoj ĝi estis identigita kun Kristo, majeste glora dum ĉieliro. En la aziaj, nord-aziaj kaj indianaj tradicioj ĝi estas la suna substituato. Tial por ke la dancistoj sukcesu en plenumado de la "danco de l'aglo rigardanta al la suno", necesas, ke ili kunhavy ĉu aglan plumon, ĉu fajfilon el agla osto. La disetenditaj flugiloj elvokas fulmozigzagadon aŭ krucon. La duaĵon ĉielo-tero respiegulas la duaĵo aglo-serpento.

Aĝlo, jen la protektanto, la iniciatanto, la kondukanto de la animoj transen. En Okcidento, mezepokaj mistikuloj komparis levigantan al Dio preĝadon kun disetenditaj agloflugiloj. Aĝlo, cetere, jen la klarvidulo, la divenisto, la aŭguristo. Helena poeto diris, ke ĝi dormas sur la scepro de Zeŭso. Islamo ne kontraŭas la aglan simbolismon; en pluraj fabeloj lerta magiisto elmontras sian superecon aliĝante al aglo. Tamen la negativan flankon de la agla simbolismo ni ne preteratentu: se ĝi prezentas Kriston, ĝia senbrida orgojlo, kaj krueleco, povas signi antikriston kaj subpremadon.

Ni nun transiru al la supre-menciitaj moŝtoj...princaj.

Alaŭdo - Paserforma birdo, per siaj fulmaj ekflugoj supren kaj plonĝaj deflugoj, ĝi simbolas evolucion kaj involucion. Peranto inter ĉielo kaj tero, ĝi kantas la vivoĝojon. La franca historiisto Michelet omaĝis al ĝi, kiel al "ĝojo-spirito, kiu volus konsoli la teron." Simbolo de pureco kaj travidebleco, bildo de l'plugisto kaj laboristo, birdo sankta kaj bonaŭgura, emblemo de la galla legio, jen nia vigluleto...

Alciono - (populara nomo de alcedo). Verde kaj lazure vestitaj, ili pare kunvivadas kaj pro tio simbolas por la Ĉinoj fidelon kaj geedzecan feliĉon. Tiu popolo komparas la delikatan noblan alcionon kun klaĉemaj vulgaraj mevoj. Marbirdo, laŭ helena legendo ido de l'vento kaj maten-

suno, ĝi simbolas fekundecon kaj materialan kaj spiritan, de ĵaluzaj diaĵoj tamen minacatan. Endanĝerigite pro memkontentigo, devenigante sian feliĉon de la propraj meritoj dum nur al la ĉielo ĝi dankŝuldas ĝin, teruran punon ĝi estas frontonta. Tial ekkriis la franca poeto Chénier:

"Ploradu, sanktaj birdoj, ho mildaj alcionoj".

Anaso - (el la ordo de la anserformaj birdoj). En Japanujo kaj malproksima Oriento ĝi simbolas unuecon kaj geedzan fidelecon, ĉar ĉiam kunkune naĝas virbirdo kaj ina. En la nupto-ĉambron oni pendigas bildon de anasa paro. Por la Indianoj, ĝi estas la fidinda gvidanto, ĉar tiel lerte en aero, kiel en akvo ĝi moviĝas. En la kelta tradicio ĝi asimiliĝas al cigno.

Falko - Tiu rabobesto estis en Egiptio la birda princo, enkarniĝo de Horuso, diaĵo de la ĉielaj spacoj, kies du okuloj estis la suno kaj la luno. Ĝi estis ankaŭ atributo de Reo, la sunleviĝa diaĵo. Ĉiuj Inkaoj havis duulon, specon de gardanĝelo subforme de falko.

Dum la X-a jarcento p.K. tre gravis la falko en kimraj leĝoj pro sia helpo en ĉasado. La mezepokuloj vidis en ĝi la venkon de la vira principo super la ina (suna falko estis ofte prezentita supervenkante lunan leporon, simbolon de volupto). Falko do simbolas suprenleviĝon fizikan, mensan kaj spiritan, venkon ĉu akiritan, ĉu akirotan. Sub kapuĉo ĝi estas la kaptito, la subbuŝela lumo, la esotera kono. Multaj renesancaj presistoj elektis, kiel emblemon, subkapuĉan falkon kun la jena devizo: "Post la mallumo lumon mi esperas".


Kolibro - (aŭ: muŝbirdo). El ĉiuj, la plej eta. Laŭ la Aztekoj la animoj de la mortintaj militistoj resurteriĝas subforme de kolibroj aŭ papilioj. Al kolibro oni ŝuldas la surteran varmon.

La Indianoj el Arizono kredas, ke ĝi ludas peran rolon ĉe la diaĵoj, kiuj respondecas pri ĝermigado kaj kreskigado. Tiel ĝi evitas surteran malsategon. En Kolombio ĝi simbolas virecon pro sia koitado kun la floroj. La Brazilanoj nomas ĝin "florkisulo".

Kolombo - En la Malnova Testamento ĝi alportas al Noa olivarban branĉon. Simbolo de paco, espero, harmonio, reatingita feliĉo. En la Nova Testamento, simbolo de la Sankta Spirito. La granda sociemo de tiu mildulo akcentas ĝian pozitivan aspekton.

En antikva Ĉinio kolombo aliformiĝis en nizon, kaj reciproke, laŭ la sezonritmo. En Kabilio kolombo ĉirkaŭas la tombon de la vilaĝa protektanto. Sed escepte tiun rolon ĝi estas taksata malbonaŭgura, ĉar kverado estas sopirado de la mortintaj animoj.

Korniko - Nigra kun griza dorso, parenca al la korvo (ĉi lasta estas dediĉita al Apolono, dum la korniko, ĝia nokta flanko, estas dediĉita al Atena). En Irlando ĝi estas unu el la nomoj de la militdiino. Ankaŭ en Gallujo troveblas la sama esprimo "bataalkorniko". Laŭtradicie korniko povas akcepti multnombrajn bestoformojn.



Kukolo

Kukolo - Tiu antaŭkantisto de la printempo simbolas en nia tradicio ĵaluzon kaj parazitemon. Heran Zeŭso konkeris sub la figuro de kukolo. En Siberio sunon kaj lunon foje prezentas du kukoloj. Ĝin prikantis la romantika poeto Wordsworth:

"Bonvenan ja ci estu, printempofavorato

"Por mi ci jam ne birdas, ci estas nevidebla estaĵo, simpla voĉo, mistero iaspeca."

Laŭ la vedaj tradicioj ĝi simbolas la homanimon antaŭ kaj post la enkarniĝo. La Afrikanoj, siaflanke, opinias, ke ĝi frenezigas la brutaron dum la varmegaj taghoroj (supozeble pro pliigo de la seksa ekscitiĝo. Laŭ populara legendo, kiu aŭdas la unuan printempan kukolon, tiu povas riĉiĝi, se moneron li tiam havas ĉe si.

Otuso - Ĉar la tagan lumon ĝi ne alfrontas, ĝi estas taksata solecema kaj malgaja. En Egiptio ĝi signis malvarmon, nokton kaj morton. En antikva Ĉinio ĝi estis perceptata, kiel besto kruela kaj malbonaŭgura (ĝi estis tie unu el la praaj simboloj, samgrade, kiel la drako). Ĉe la Indianoj tamen, ĝi estis dumnokta protektanto, sed morton anoncis ĝia kanto. Mankas ĝi en la kelta simbolaro. Supozeble sub influo de kristanismo, ĝi ne estas tre ŝatata besto.

Pego - Pro sia longa fortika beko, per kiu ĝi arboŝelon trapikas, ĝi estas taksata prudenta zorgemulo. Nealirebla montriĝas pega nesto; tial certas la birdo, ke grandaĝe ĝi mortos, ŝirmate de la eksteraj danĝeroj. En ĉiuj tradicioj ĝi simbolas sekurecon. Protektanto de la homspecio ĝi estis la birdo al Marso dediĉita (birdo-profeto, kiu alflugis al la kaverno, kie supervivis Romulo kaj Remo. Ĝi ilin provizis per nepre necesa nutraĵo.)

Laŭ vidpunkto de psikanalizo ĝia kutimo arboŝelojn trapiki signas tendencon al introverto, deziron reeniri la patrinan uteron!

Regolo - Paserforma, kun flava makulo surkape, tiu malgranduleto en la kelta mitologio iras duope kun la korvo, samkiel iras duope druido kun militisto, apro kaj urso. En la irlanda lingvo "regolo" signifas "druido(n) de la birdoj". Malnova kimra proverbo minacis je infera turmentado la detruantojn de regolnestoj.



En Bretonio ekzistas la tiel-nomata "kanzono de l'regolo" dum en la malnova bretona lingvo "regolo" estas samsenca, kiel "ĝoja". Ĉe la Indianoj la regolsimbolismo respondas tiun de nia alaŭdo.

Strigo -Unu el la praaj bestoj, saĝo- kaj sperto-plena. Kun siaj antaŭendirektitaj okuloj tiu noktuo ligiĝas kun la luno. Male de la aglo, kiu ricevas la sunan lumon rekte en la okulojn, la strigo simbolas la racian konon, ne intuician sed respegulatan, kiel la lunolumo. Klarvidulo estas la strigo, sed pere de la signoj. Ĉe la Aztekoj ĝi, kun araneo, simbolis la inferajn diaĵojn. Ligita kun la morto kaj fortoj de la nekonscio ĝi estas la gardisto de la tombejoj.

Paĝo de la

Geknaboj

Mi diru al vi pri la naskiĝfesto de Karen, nun sesjara, unu el miaj kvar genepoj. Ŝiaj gepatroj, en ŝia nomo, gastigis dektri el ŝiaj geamikoj, ne ĉe la familia domo, sed al la loka ludejo. Oni nomis ĝin amuzuzino. Ĝi troviĝas en unu el la ĉefstratoj de nia urbo, Weston-super-Mare, en sudokcidenta Britio.

Karen iris per la gepatra aŭto, kune nun sia frato Alex, sepjara, kaj du amikoj. Mia edzino kaj mi iris per nia aŭto kune kun Andrew, naŭjara kaj Megan, sepjara, niaj aliaj genepoj. La ceteraj gastoj iris per la aŭtoj de siaj gepatroj.

Ĉe la enirejo, la unua rimarkenda afero estis la konstanta bruego de ludantaj infanoj. Ene estis du cent geknaboj inter kvin kaj dek jaraĵoj. Mia filino pagis po unu brita pundo por ĉiu invitito kaj Karen mem. Tio rajtigis ilin resti tie tiom longe, kiom plaĉis al ili.

Rapide la infanoj deponis siajn paltojn, ŝuojn, kaj tuj malaperis. Ni kvar plenkreskuloj portis skatolojn plenplenajn de festomanĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Ni fariĝis helpantoj al la atletoj, kiam ili revenis unu-duope por refreŝigi sin. Atletoj ili ja estis, ĉar ili konstante kuris, saltis kaj grimpis.

La du-etaĝa amuzuzino konsistas el ŝtalaj kadroj, retaj muroj kaj plastaj plafonoj. Ĉio koloriĝas aŭ ruĝe, verde, blue aŭ flave. Forta, dika plastfilmo de la samaj koloroj kovras la diversajn obstaklojn. Kie ajn oni povas fali estas dika, mola, plasta kuseno.

Sur la unua etaĝo estas ĉambro, travidebla pro retaj muroj. Ĝi estas plenplena, ĝisgenue, de malgrandaj plastaj pilkoj. Oni povas ludi kvazaŭ en akvo kaj ĵeti la pilkojn sendanĝere, ĉar ili estas molaj. Estas ŝtuparoj por eniri la ĉambron, kaj de unu el ili oni atingas la najbaran sektion.

Ĝi enhavas platformon, de kie oni povas glitpendi. Laŭlonge de la plafonoj estas du reloj. De ĉiu relo povas pendas mallonga, dika ŝnuro, kun granda nodo ĉe la fino. La reloj estas grade deklivaj. Oni povas teni ŝnuron, salti de la platformo, kaj glitadi tridek metrojn. Ne gravas la rapideco, ĉar fine oni falas sur kusenojn.

Apud tiu sekcio estas du ejoj kun kvar muroj sed neniu tegmento. Ili estas konstruitaj el grandaj, rektangulaj kusenoj. Oni povas preteksti, ke unu el la ejoj estas kasteleto, kiun oni devas defendi kontraŭ atakantoj. Ne gravas kien oni falas. Ĉiu surfaco estas mola.

Najbare estas longa, larĝa tubo, subtenita ĉiufine de fortaj stangoj. Ĉiuj estas kovritaj de dika, plast-ŝaŭmo. Oni povas grimpi sur ĝin, kaj provi marŝi senfale.

Grimpante spiralan ŝtuparon oni atingas la duan etaĝon. Tie estas "frenezaj grotoj", en kiuj ĉio tuŝebla ŝanceliĝas. Ankaŭ estas "rivoluantaj pordoj", en koridoro. Ĉar ili estas tre molaj, oni povas kuri rapide tra dek pordoj, sendolore.

De tiu sekcio estas ponto. Ĝi transiras la lokon en kiu ni, helpantoj, sidis. Per ĝi oni atingas du horizont-alajn, lanugajn, cilindrajn rulojn, unu super la alia. Inter ili estas sufiĉe da spaco por plonĝi en pluan sektion.

Tie estas "grotoj de drako kaj sorĉistino". Oni povas ataki la drakon kaj sorĉistinon laŭplaĉe. Ili estas grandegaj sed fabrikitaj el mola plastŝaŭmo. Kompreneble ili neniam reprezalias. Tamen oni povas eskapi tra malgranda spaco inter du vertikalaj, cilindraj ruloj. Poste oni transiras duan ponton. Fine oni iras malsupren per longa glitdeklivo kaj alvenas en "karcero". Sed eble ne fine, ĉar la geknaboj elkuras kaj ripetas sian rondiron denove, kaj denove, ofte en la kontraŭa direkto. Dum preskaŭ du horoj ili amuziĝis, ĝis kiam iliaj gepatroj alvenis.

POR VIA


DISTRO

Trovotaj vortoj: 1-lokomotivo; 2-serpento; 3-Kalifornio; 4-kardinalo; 5- talismano; 6-kilometro; 7- serenado; 8- dinastio; 9-spekulaciisto; 10- Palestino; 11- kuniklo; 12-Cejlono; 13- Kalcedono; 14- januaro; 15-kuracado; 16-^{*}cejano; 17- cent dekdu; 18-esperanto.

Trovota frazo de L. Pasteur: Mi estas certa, ke la scienco kaj la paco venkos la stultecon kaj la militon, kaj ke la popoloj fine decidus ne detruadi unu la alian sed kreadi kune.

NOVA ENIGMO

(Vi devas trovi proverbon)



DEKSTREN MALSUPREN: 1-Nomo de greka litero. 2-Spirebla gasmiksaĵo. 3-Parto de la fiziko studanta lumfenomenojn. 4- Lirika poemo - briliga substanco. 5- Vicmontra numeralo - malĝusta. 6- UNUA PARTO DE LA PROVERBO. 7- Mergante lavi - rapide graviĝanta. 8- Fazeolaj grajnoj - prezentejo en cirko. 9- konstruaĵoj - monunuoj. 10- virseksan homidon - greka dio. 11- DUA PARTO DE LA PROVERBO. 12- regulaj sesedroj - aloj' el fero kaj karbono. 13- malantaŭa parto de la kolo - greka prefikso. 14- ripeta. 15- malmole. 16- konkluda konjunkcio.

MALDEKSTREN MALSUPREN: 7- litero "ŝ". 8- korneca buŝo. 9- mezurunuo de kapacitanco. 10- ritma movad' - kolektiva. 11- kun angora timo - nia planed'. 12- parazita insekto - febra stato kun halucinacioj. 13- subteraj provizejoj - azia ŝtato. 14- numeraloj - riza brando. 15- malhelruĝa juvelŝton' - havigo al si. 16- dekmembra kolektiv' - abrupta. 17- en du fojoj - per reto. 18- altvalora metalo - rilata al rara gaso. 19- ĉambro - aervibrado. 20- knedebila tero. 21- jugoslava prezidento. 22- kondiĉa subjunkcio.

LA VIVO EN GRESILLON

ĜENERALA KUNVENO DE LA 21-a DE APRILO 1990

Prezidas tiun kunvenon s-ro F. Boyet; protokolas: J. Turbillon.
S-inoj R. Lenel kaj N. Babin kontrolas la voĉdonilojn.

Nombrado de la ĉeestantaj kaj reprezentataj membroj montras, ke la kvorumo estas atingita. La decidoj de la asembleo estas plenrajtaj.

D. Babin legas la laŭlegajn rezoluciojn: 48 akcioj estis repagitaj kaj 138 novaj akcioj estis venditaj. 107 novaj membroj aliĝis en 1989. La akcia kapitalo estis, fine de 1989, 197 500 frankoj.

Financa raporto- Pro la kresko de la tranoktoj la restad-enspezoj kreskis. Al demando de S-ro Hartridge pri la procento de okupado de la litoj la respondo ne povas esti tre preciza pro tio, ke ofte okazas, ke unuopulo okupas dulitan ĉambron aŭ, ke paro okupas trilitan ĉambron. Estas okdek litoj en la kastelo, en tridek du ĉambroj.

La elspezoj pri salajroj kaj aĉeto de nutraĵoj kreskis paralele kun la kresko de la nombro da ĉeestantoj. Responde al demando pri la altiĝo de la elspezoj pri asekuro estas klarigite, ke la nova kontrakto kun la MAIF estas pli kosta ĉar ĝi estas pli kompleta. Plie, komence de la jaro, ni pagis por 1989, kaj en decembro por 1990.

Resume la financaj plusoj pli ol duobligis. Tio ebligis la refaron de la fasadoj.

La financa raporto kaj la bilanco estas unuanime aprobitaj.

AGADRAPORTO- Perletere S-ro Rousseau petas, ke oni aldonu frazon pri la juna periodo, kiu, kvankam neformala, kunvenigis pli ol tridek personojn. Iu rimarkigas, ke la staĝoj ne organizitaj de La kulturdomo ne aperas en la programo. La respondo estas, ke la programo aperas en oktobro kaj, ke la proponoj pri "eksteraj" staĝoj aŭ renkontoj tre ofte alvenas poste. S-ino Vincent rimarkas, ke la dumpaska staĝo estas forgesita. La prezidanto precizigas, ke la Paska staĝo kunvenigis tridek personojn. Ĉiam ĝenas la malsamaj datoj de la libertempoj.

La agadraporto estas unuanime aprobita.

Diversaj decidoj- La prezidanto prezentas proponon de S-ro Watier, kiu kandidatigas personon solan por prizorgado de la bieno dum la tuta jaro. Pro malsukcesaj antaŭaj provoj estis decidite serĉi malsimilan solvon. Plie la proponita persono ne estas esperantisto. Pro tiuj kialoj kaj diskuto pri la financa aspekto, la propono de S-ro Watier estas unuanime malakceptita.

S-ino Vincent rimarkas, ke ne plu ekzistas informilo pri Gresillon. Estas decidite reeldoni folion, franclingve kaj esperantlingve.

Rezulto de la voĉdonado- 278 membroj voĉdonis. 273 bultenoj validas.

Dominique BABIN ricevis 272 voĉdonojn.

Henri BOYET ricevis 273 voĉdonojn.

Bérangère CHEVERRY ricevis 273 voĉdonojn

George LAGRANGE ricevis 272 voĉdonojn

Paulette GEMIN ricevis 273 voĉdonojn.

Paulette NAULET ricevis 272 voĉdonojn.

Ĉiuj kandidatoj estas elektitaj.

La sekretario: J. Turbillon

Komitatkunveno - Dimanĉon la 22-an de Aprilo 1990

Dominique Babin, la prezidanto, bonvenigas la ĵus elektitajn konsilantinojn, S-inon Paulette Naulet kaj S-inon Paulette Gemin. Estas necese elekti novan estraron. Ĝi konsistos el:

Prezidanto: Dominique BABIN

Vic-prezidanto: Berengère CHEVERRY

Sekretario: Guy DAIRON

Help-sekretario: Henri BOYET

Kasisto: Jeanine VINCENT

Help-kasisto: Paulette NAULET

Kiel konsilanto, Pierre BABIN zorgos pri la financaj aferoj ĝis la fino de la jaro 1990 kaj dume informos la kasistinojn kaj la help-kasistinojn pri la funkciado de tiu flanko de la administrado.

Staĝoj 1990- Ĝis nun la nombro da ricevitaj aliĝoj estas kontentiga. Dum la somero gvidos kursojn, po du aŭ kvar semajnoj, Eva Bondar, Marie-Joseph Berger, Marie-Thérèse Lloancy, s-ino Lostukova, Catherine Roux, Jeanine Vincent, Przemek Grzybowski, Joël Laporte, Daniel Moirand. Georges Lagrange gvidos kurson pri tradukado dum la lasta semajno de julio, kaj Jeanine Vincent gvidos similan kurson dum la lasta semajno de aŭgusto.

Disdividos inter si la administradon de la staĝoj dum la somero, po du personoj por ĉiu staĝo: Dominique kaj Nicole Babin, Pierre kaj Luce Babin, Dominique Baron, Renée Lenel, Robert Lloancy, Josiane Moirand, Jeanine Vincent.

Diversaĵoj- La nova perkoresponda kurso estos proponita en septembro. Estos necese modifi kelkajn detalojn antaŭ tiu dato.

La Esperanto-Domo bezonas faldeblan propagandilon kaj afiŝojn. Tia materialo estas ofte petata por ekspozicioj. Projektoj jam ekzistas. Estos necese pliperfektigi ilin.

La prezidanto diras, ke nun necesas refarbi eĉ, en kelkaj kazoj, ŝanĝi eksterajn fenestrojn kaj pordojn de la kastelo. La elspezo estos grandega. La prezidanto petos prezo-taksadon.

La meblaro de la kurso-ĉambroj postulas kelkajn plibonigojn. Listo de la aĉetotaĵoj estos farita. Estos studata ankau la ebleco registri sur videobendojn la filmoj de Gresillon, ĉefe "Angoroj".

La komitato decidas nomi teknika konsilanto Jean-Philippe Bobet, kiu jam helpis en la prizorgado de la bieno. Li vizitos la kastelon sufiĉe ofte dum la eksterstaĝaj periodoj, okupiĝos pri la prizorgado per memfaritaj malgravaj riparoj kaj rigardo al la laboro de la metiistoj.

La prezidanto parolas denove pri la neceso dispartigi la diversajn taskojn. Sino Vincent proponas zorgi pri la sendado de informoj kaj rezervado de ĉambroj.

La kunsido finiĝas je la 16-a horo.

La sekretario: Guy DAIRON

NIA KONKURSO



Tiu konkurso, kies unua serio aperis en la numero 1990-1, proponos, ĝis la lasta ĉijara numero, entute kvar seriojn de enigmoj kaj demandoj. Ĉiu serio povos doni ĝis 20 poentoj. La partoprenantoj rajtas sendi siajn respondojn post la apero de ĉiu serio aŭ kune post la apero de la lasta. La tuton oni estu sendinta plej malfrue la 15-an de februaro 1991.

La premioj estas :

1 - 1 000 f.f. por restado en Grésillon.

2 - 500 f.f. por restado en Grésillon.

3 - 250 f.f. por aĉetado de libroj el nia katalogo.

4 - 150 f.f. por aĉetado de libroj el nia katalogo.

5 - 100 f.f. por aĉetado de libroj el nia katalogo.

DUA SERIO

1 — Jen la nomoj de kvin aŭtoroj, kiuj verkis originale en Esperanto. Vi devas kompletigi tiujn nomojn ĉar mankas la konsonantoj. Por helpi vin ni aldonas interkrampe la titolon de unu el la verkoj de ĉiu el ili :

— a — o — ay (Vojaĝo tra la Tempoj).

— ou — o — (Kontralte).

— o — e — i (El la maniko).

— i — a — yi (Trans la fabeloceano).

— o — e (M. Tot aĉetis mil okulojn).

2 — La respondoj al la subaj demandoj troviĝas en tiu ĉi numero de la revuo :

— Kio estas kriptologio ?

— Kiujn kuriozaĵojn la turistoj povas vidi en la kastelo Saint-Mars ?

— Kio okazis en Belgio en 1789 ?

— Kiu eksterlandano estis deputito en la Konvencio ?

— Kiu birdo simbolas fidelon por la Ĉinoj ?

3 — El tiuj tri eminentaj esperantistoj, Hector Hodler, Hans Jacob, Claude Piron, Edmond Privat, tri naskiĝis en la sama lando. Kiuj ? En kiu lando ?

4 — Ĉu la subaj asertoj estas veraj aŭ ne. Respondu per « jes » aŭ « ne ».

— Charlie Chaplin uzis Esperanton por sia filmo « Reĝo en Novjorko ».

— Jean-Louis Mahé produktis la filmon « Angoroj ».

— E.L.F. signifas « Esperanto-Ligo Filatelista ».

— La vera nomo de Lanti estis Adam.

— La Internacia Pedagogia Revuo aperis la unuan fojon en 1928.



Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (7,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj).

Jugoslavio : Jugoslavia Stelo, D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo.

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 21 Rama Crescent Khandallah - Wellington 4 (aerpoŝte : 16 n.z.dol.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboã.

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 2012-3 (70 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771, LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs.).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60304 (15 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

Por ripozl trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni ia internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la Esperantista Kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34